

IV

Necessidade de uma Língua Internacional

Urgia, desse modo, não apenas para o ajuste de humanas cogitações, a criação de uma língua auxiliar que interligasse os territórios do espírito. Um sistema de comunhão que exonerasse os lidadores do avanço intelectual de maiores entaves para o acesso aos tipos mais altos de cultura...

Ansiavam milhões de almas pela libertação das algemas lingüísticas que lhes mumificavam as expressões.

Espíritos habilitados a vôos amplos, nos céus da ciência e da arte, da instrução e da indústria, restringiam-se aos preceitos e ritos mentais dos tratos de gleba em que agiam ou renasciam, sufocados no círculo angusto de parco vocabulário, quais pássaros de majestoso poder, aprisionados na férrea gaiola da insipiência.

Grandes comunidades imperiais, quais a Rússia e a Grã-Bretanha, mostravam-se divididas por línguas várias e múltiplos dialetos, afigurando-se como corpos gigantesco em que o sangue mental circulasse deficiente.

IV

Neceso de unu Lingvo Internacia

Tiamaniere, ne nur por la kontentigo de homaj pretendoj urĝiĝis la kreado de unu helplingvo, kiu interligus la teritoriojn de la spirito. Urĝiĝis ia sistemo de komuneco, kiu liberigus la batalantojn de la intelekta progreso, je pli grandaj embarasoj, por aliri al la plej altaj tipoj de kulturo...

Milionoj da animoj deziregis liberiĝi de la lingvaj katenoj, mumiigantaj al ili la esprimojn.

Spiritoj kapablaj por vastaj flugadoj sur la ĉielo de la scienco kaj arto, de la instruoj kaj industrio, limiĝis sin al la mensaj preceptoj kaj ritoj de la rigionoj, kie ili agadis aŭ renaskiĝis, sufokitaj en la malvasta cirklo de malabunda vortprovizo, kvazaŭ iaj birdoj de majesta povo, enfermitaj en la fera kaĝo de malklereco.

Grandaj imperiaj kolektivoj, kiel Ruslando kaj Britujo, montriĝis dividitaj en diversaj lingvoj kaj pluraj dialektoj, simile al gigantaj korpoj, en kiuj la mensa sango cirkuladus nesufiĉa.

E além da paisagem propriamente terrestre, as criaturas libertas do carro físico, se excepcionalmente evoluídas, no intervalo das reencarnações necessárias, via de regra não conseguiam transcender a fronteira de realizações dos grupos raciais a que se viam jungidas.

Inteligências dos conjuntos asiáticos, africanos, ameríndios, latinos, eslavos, saxônios, e de outros agrupamentos permutavam aquisições, imolando cabedais insubstituíveis de tempo.

Verificando as imensas dificuldades para o intercâmbio de tribos e povos desencarnados, especialistas espirituais de fonética, etimologia e onomatopéia empreenderam a formação de um idioma internacional para entendimento rápido nas regiões espaciais vizinhas do Globo, multiplicando, em vão, tentames e experiências, até que um dos grandes missionários da Luz, consagrado à concórdia, tomou a si o exame e a solução do problema.

Kaj trans la pejzaĝo ĝustedire surtera, la estuloj liberigintaj de la fizika ĉaro, se eksterordinare evoluintaj en la intertempo inter la necesaj reenkarneigoj, plejofte ne sukcesis transpasi la limon de realigoj de la rasaj grupoj, al kiuj ili estis jungitaj.

Saĝuloj el la aziaj, afrikaj, amerikaj, slavaj, saksaj kaj el aliaj landgrupoj interŝanĝis spertojn, oferante neanstataŭigeblajn kapitalojn de tempo.

Konstatante la senlimajn malfacilaĵojn por la interŝanĝo fare de elkarnigintaj triboj kaj popoloj, spiritaĵoj pri fonetiko, etimologio kaj onomatopeo kreis internacian idiomon por tuja kompreno en la spacaj regionoj proksimaj al la Ter-globo, vane multobligante provojn kaj eksperimentojn, ĝis unu el la grandaj misiuloj de la Lumo, sindoninta al la konkordo, prenis sur sin la ekzamenon kaj la solvodon de la problemo.